

INTERKONSENTO INTER UEA KAJ ILEI

Universala Esperanto-Asocio (UEA), la ĉefa kunordiga organizaĵo por esperantistoj, kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), la faka asocio pri instruado, interkonsentas jene:

1. UEA komisias al ILEI la plenumon de signifaj partoj de sia internacia eduka laboro; tio povas inkluzivi ĉiajn agadojn por altigi la lingvan kaj kulturen nivelon de la esperanto-parolantoj, por disvastigi la instruadon de la internacia lingvo ĉiunivele kaj por rilati kun edukaj instancoj tiucele. Farinte tion, UEA establis kun ILEI aparte proksiman ligan, kion spegulas la kunlaboraj interrilatoj inter la du organizaĵoj kaj la kerna rolo de edukado en la Strategia Plano de UEA;

Deleted: ,

Deleted: estas

Deleted: (i.a. ekzamenoj)

Deleted: ;

Deleted: ¶

2.

Deleted: intiman kaj

Deleted: 3

2. ILEI regule informas UEA pri siaj agadoj kaj atingoj; la periodaĵoj kaj rimedoj de UEA estas malfermaj al ILEI por disvastigi tiujn atingojn kaj fari alvokojn al la membraro de UEA. La revuo kaj kursmaterialo de ILEI estas simile malfermaj por raporti pri la agado kaj aranĝoj de UEA. La organizaĵoj kunlaboras proksime en kampoj de komuna intereso;

Deleted: , kaj eventuale reciproke nomas komisiitojn

3. Cele al reciproka informfluo, ĉiu organizaĵo rajtas nomi observanton ĉe la estrarkunsidoj de la alia, kiuj estas krome membrigataj en reta estrara diskutgrupo de la alia; tagardoj kaj protokoloj de ĉiuj estrarkunsidoj estas interŝanĝataj. Laŭeble okazu komuna estrarkunsido en la UK;

Deleted: 4

Deleted: en du ekzempleroj

4. UEA kaj ILEI interkonsiliĝas fiksante datojn de kongresoj, estrar- kaj komitatkunsidoj, k.s. por ke ili ne koliziu.

Deleted: 5

5. UEA senpage disponigas en la UK salonojn por la internaciaj ekzamenoj, la Tago de la Lernejo kaj la faka kunsido de ILEI, adekvataj al la bezonoj kaj eblecoj. UEA krome laŭnecese disponigas dum la UK senpagan budon, kie ILEI povu prezenti sian laboron kaj varbi membrojn. Siavice, ILEI senpage disponigas al UEA tempon kaj lokon en la ILEI-konferencoj por sinprezento aŭ similcela elpaŝo.

Deleted: 6

6. En kazo de komunaj eldonaĵoj, UEA kaj ILEI fiksas komunan eŭran vendoprezon.

Deleted: 7

7. ILEI, fine de ĉiu kalendara jaro, dokumentas siajn financajn bezonojn por la venonta jaro. La estraro de UEA prijuĝas tion kaj enkorpiĝas la rezulton en la buĝeton por la koncerna jaro.

Deleted: , en la kadro de la

Deleted: , prezentas tiun peton al la Komitato kaj agas laŭ ĉi ties decidoj

Deleted: 8

8. Konklude, ambaŭ organizaĵoj respektas kaj la statutajn celojn kaj la memstarecon de la alia. Ĉi tiu interkonsento ne malhelpas kunlaboron kaj interkonsenton en terenoj ne menciitaj ĉi tie. UEA kaj ILEI komune subtenas indajn edukajn iniciatojn, kiuj konformas al nia komunaj celoj, ekzemple <edukado.net> kaj <lernu.net>;

Deleted: 9

9. La interkonsento ekvalidas post akcepto flanke de la du komitatoj/ kaj restas senlime valida. La Komitato de UEA aŭ ILEI rajtas malvalidigi ĝin, doninte tri monatojn de averto pere de la estraro de la alia organizaĵo.

Deleted: 10

La interkonsenton akceptis la Komitato de UEA en Havano je 1990 07 20. Reviziopropono estas verkita je 2010 01 10.

Deleted: ¶

Formatted: Normal (Web)

La supra teksto estas aprobita de ambaŭ estraroj. La komitato de ILEI traktos la dokumenton per reta voĉdono. La Komitato de UEA traktos ĝin en Havano, 30 jarojn post la originala akcepto, en la sama urbo, sama kongresejo kaj eventuale ech la sama salono. En la supra teksto substrekoj indikas aldonojn, balontekstoj dekstre indikas forstrekojn. Jen la kernaj shanghoj, lau alineoj:

1. UEA delegas ne chion edukon, sed multon - lasante al si la eblon agi surkampe. La rolo de edukado en la Strategia Plano de UEA estas fiksita.
2. Pro observantoj (kiuj ne nur pasive observas!), komisiitoj ne necesas.
3. Aktualigita al la komputika epoko.
7. La financa disponigo estas traktita je estrara nivelo.
8. Ni agnoskas la rolon de agantoj pliaj ol nur UEA kaj ILEI.